



# NEDERLANDA ESPERANTISTO

MAANDBLAD VAN DE NEDERL. ESPERANTISTEN-VERENIGING  
„LA ESTONTO ESTAS NIA”

Onder redactie van het Hoofdbestuur

REDACTEUR:

F. Weeke

Ijsseldijk 20, Diepenveen

Voor leden

gratis.

ADMINISTRATEUR:

P. M. Mabeesoone

Pythagorasstr.122,Amsterdam-O.

## Renkonto kun La Hipnotigisto Robert Pinard.

„Jjt!” aŭdiĝis. Mano flugis tra la aero kaj jen falis 20 homoj dise surteren!

Tiel post kelkaj enkondukaj paroloj la fama franckanada hipnotigisto Robert Pinard komencis sian demonstracion en la Montreala kinejo „Odeon”, kun proksimume 20 homoj, kiujn li dise alvokis el la antaŭaj vicoj de la salonego.

Kun streĉo mi vidis la tre interesan prezentadon, ĉar, kvankam mi tre bone scias, ke la ekzisto de hipnotismo estas neforigebla vero, tamen mi al mi realigis, ke ĝuste en la regionoj de la „nigra arto” okazas multe da trompo. Kaj verfakte mi trovis kelkajn lertaĵojn ankaŭ ĉi tie, kiujn oni ankaŭ en ordinaraĵ konsciencaj cirkonstancoj povas fari sukcese.

Tiel ekzemple la hipnotigisto sugestis al hipnotigita junulo, ke li estas tute rigida, tu-te ri-giii-da! La junulo streĉiĝis kaj tiam la hipnotigisto kaj helpanto prenis lin kaj metis lin sur du seĝojn tiel, ke la kapo kun ŝultroj kuŝis sur unu kaj la piedoj kaj suba parto de l' kruroj sur la alia. Tiam s-ro Pinard ekstaris sur li kaj restis tiel kelkajn momentojn. Poste tri homoj sidiĝis sur li, sed tiel, ke la eksteraj du troviĝis super tiuj partoj de la korpo de l' viktimo, kiuj restis ankoraŭ grandparte sur la seĝoj, kiu do grandparte transprenis la preman-tan pezon. Mi provis poste kun kelkaj kolegoj la samon kaj la rezulto eŝtis samsukcesa. Tiel okazis ankoraŭ kel-

kaj aliaj lertaĵoj, kiuj certe ne atestas pri nepre necesa ekzisto de hipnotismo, sed kiuj nur uziĝis por glatigi, plirapidiĝi, pli imponigi la reprezentadon. Do certe tio ne volas diri, ke la tuta demonstracio estis trompo! Ĉar pli multfoje mi vidis tiajn nekrediblaĵojn, ke ili por si mem estis klaraj pruvoj de nepre necesa superregiĝo de l' hipnotismo. Ekzemple Robert Pinard sugestis al la viktimarino, ke ili estas statuoj. En la sama momento ili ĉiuj alprenis tiajn strangajn sintenojn, ke la salonego ekridegis. Ho jes, certe ankaŭ vi povas en normalaj cirkonstancoj alpreni tiujn sintenojn. Sed ĉu ankaŭ dum tia longa tempo?

Cu vi povas staradi kvaronhoron kun la brako plene antaŭen streĉita? Mi provis, sed kun peno plenigis kvin minutojn!

S-ro Robert Pinard sugestis, ke oni sin sentas tre varma, kaj tuj forflugis la vestoj! Poste li sugestis malvarmon kaj tuj la viktimoj zigzagis pro malvarmo sur la planko kaj forŝiris donitan litkovrilon el la manoj de la servisto por volvi sin en ĝin.

Li sugestis jukon sur la piedfingroj kaj tuj flugis ŝuoj kaj ŝtrumpoj sur la podion kaj oni bategis la piedojn sur la plankon aŭ pinĉadis kaj frotadis ilin terure. Ili drinkis neekzistantajn drinkojn, ebriiĝis kaj terure balbutadis, kantaĉis kaj ploradis. Oni naĝis, fiŝkaptadis, muzikludis kaj „rock-and-roll”-adis kaj ne dum kelkaj etaj momentoj, sed dum multaj minu-

toj. Ripozon ili ne ricevis; tuj post unu sugesto ili ricevis alian kaj tiel la mediumoj laboregis tiom dum unu horo kaj tio certe ne estas eltenebla por homoj sub normalaj kondiĉoj. Kelkfoje li klakis per la fingroj ĉe la orelo de iu, kiu tiam tuj vekigis kaj tre surprizite ĉirkaŭrigardis kaj ekridis pro la stranga sceno. Kiam li en tia kazo volis forkuri de la scenejo, gesto de la majstro estis sufiĉe por faligi lin endorme en seĝon.

Rimarkeble estis, ke la gehipnotigenduloj estis ĉiuj gejunuloj inter-18-kaj-25-jaraj.

Post duona horo da ripozo s-ro Pinard, kvankam ankoraŭ tre laca, permesis al mi lin intervjui.

Survoje al lia ĉambro mi trovis malantaŭ la kurtenoj kelkajn el la volintoj kaj kvankam s-ro Pinard mem tion neis kaj mi ne povas pruvi

### Mabesoone-Fondajo.

En la aprila numero de „N.E.” ni jam sciigis, ke la saldo de la fondajo en la fino de 1957 estis ... F. 629,01 Poste envenis ankoraŭ por 1957 de la sekcio Alkmaar - 17,—

do entute por 1957 F. 646,01

De la 1-a de januaro ĝis la

1-a de majo 1958 envenis de

L. C.-S. en Gr. F. 5,—

F. W. en D. - 5,—

Mr. P. v. D. en D. - 5,—

A. D. en L. - 10,—

sekcio Alkmaar - 11,—

„ Deventer - 20,— - 56,—

En majo 1958 envenis de

E. de W. en H. F. 2,60

W. P. S. en Gr. - 10,—

W. v. d. M. en L. - 5,—

J. C. K. en Z. - 5,—

A. H. v. D. en H. - 10,—

N. N. en V. - 10,—

L. C. S. en Gr. - 15,—

B. A. kaj G. R. en L. - 20,—

C. B.-O. en A. - 5,20 - 82,80

En junio envenis de sekcio

„Merkurio” en Rotterdam - 25,—

Saldo 1/7 '58..... F. 809,81

Karaj gemembroj, se vi bone rigardas ĉi tiujn ciferojn, vi konstatos, ke en la unua duono de 1958 envenis F. 163,80. Ĉu vi estas kontentaj pri tio? Ne ni! La ĝironumero de la kassistino, f-ino J. E. Prins, Hora Siccamasingel 294, Groningen, estas ja **815889!**

(Por saĝulo sufiĉas aludo, ĉu ne?)

ion, mi ricevis tamen la fortan impreson, ke inter la veraj gevolontoj troviĝas kelkaj pagitoj, kiuj intence lasis sin tuj sen ia rezisto hipnotigi, tiel influante la aliajn, por ke tiuj pli facile sekvu la pagitojn.

Je mia bedaŭro s-ro Pinard povis paroli nek Esperanton, nek la anglan, do mi devis lin intervjui en la franca lingvo, kiun mi ne tre bone regas.

S-ro Robert Pinard naskiĝis en 1927 en la franckanada urbeto Sherbrooke en la provinco Québec.

Jam en sia 8-a jaro li hipnotigadis. Ankaŭ lia patro sin okupis pri la hipnotigado. Tamen ne pensu, ke li havas la en tiu kazo supozatajn brulantajn, penetrantajn okulojn! Ho ne, li havas ordinarajn afable rigardantajn okuojn kiel ankaŭ vi kaj mi povus havi.

Post mia demando, ĉu s-ro Pinard uzas la hipnotkapablon por sensacio, li respondis, ke tio ne estas la kazo, sed ke li ekz. dum kelka tempo laboris en hospitalo en Lyon por hipnotigi pacientojn, kiuj estis operaciendaj. Robert Pinard uzis tie do kun sukceso la hipnotismon kiel anstataŭaĵon de l' narkotiko. Je mia posta demando, ĉu li demonstraciis multe en la eksterlando, s-ro Pinard nomis multajn nomojn de urboj, kie li demonstraciis, i.a. Sebastopol, Parizo kaj Bruselo, kaj fiere la majstro montris al mi brilantajn artikolojn kun klaraj bildoj, kiuj aperis en „Point de Vue d'images du Monde” (Parizo), „Le Soir Illustré”, „Paris Match”, „La Presse” k.a.

„Grandioza estis mia demonstracio en la Pariza Alhambra en 1954-a, kie mi la 12-an de junio hipnotigis la tutan judo-klubon „Alhambra”, li rakontis.

Post mia demando, ĉu li povas hipnotigi ĉiun personon, la hipnotigisto respondis, ke li povas influu ne ĉiun, sed ja grandan procentaĵon. Li rakontis, ke la hipnotismo estas parenca al telepatio, do ke ĝi estas afero de penso-transportado, pensenfluigo. „Ne limigita al iu tempodaŭro ĝi estas”, certigis la majstro al mi. „Mi tenis personon facile tri horojn sub influo kaj eĉ ne necesas vidi lin, ĉar same efikas, kiam estas distanco de diversaj kilometroj inter mi kaj la mediumo”.

„En la hipnotismo ekzistas”, tiel daŭrigis s-ro P., „instigi inteligentajn influitajn personojn, ke ili parolu en lingvo, kiun ili mem neniam studis,

## Protokolo pri la Jarkunveno de L.E.E.N.

(okazinta dimanĉon, la 11-an de majo 1958, en la hotelo „Noord-Brabant” en Utrecht.)

1. Je la deka kaj duono la prez. s-ro Weeke malfermas la kunvenon. Dum sia parolado li voĉlegas la rezolucion akceptitan en kongreso de la Nederlandaj Mondfederalistoj.
2. S-ino Koopmans-Schotanus kantas la L.E.E.N.-kanton laŭ nova melodio komponita de s-ro Schippers.
3. Kiel protokolantoj estas elektataj s-roj Arends kaj Woessink.
4. La listo de voĉdonrajtaj delegitoj estas fiksata.
5. Ne estas komunikoj kaj evenintajtoj.
6. La protokolo de la antaŭa jarkunveno estas sen rimarkoj akceptata.
7. La delegito de „Merkuro” deziras, ke en la sekretaria raporto estu io menciita pri la sekcio vivo. La prez. diras, ke nur malmultaj sekcioj sendis jarraporton, la ĉefestraro estonte sendos al la sekcioj demandaron kaj pere de ĝi atendos pli da informoj pri la sekcioj.
8. Rotterdam („Merkurio”) demandas pri la skriba kurso. S-ro Albers respondas, ke ĝi donis malaltan profiton. Sen aliaj rimarkoj la financa ra-

aŭ ke ili ludu muzikinstrumenton, per kiu ili neniam antaŭe ludis”.

Kvankam s-ro P. dum sia demonstracio en Odéon uzis mikrofonon, tra kiu li tre sugesteme alparolis la viktimojn, li rakontis, ke lia parolo ne estas ĉefa afero en la hipnotismo, ĉar eblas influu eĉ personon, kiu lin ne komprenas (pro ekz. lingvodiferenco) kaj eĉ iu parolo ne necesas.

Antaŭ ol foriri mi petis s-ron P., ke li bonvolu doni malgrandan demonstracion kun mi mem kiel viktimo. Li forte rifuzis tion, dirante, ke li estas treege laca pro la okazinta prezentado. Kiam mi sugestis reveni la sekvontan tagon por tiu eksperimento, li diris, ke li tiam forvojaĝos, sed ke li volonte plenumos mian deziron iam en la estonteco.

Kun la scio esti lerninta multe en tiu vespero mi forlasis majstron Robert Pinard.

K. Ruig.

porto estas akceptata.

9. Neniu havas rimarkojn pri la raporto de la kaskontrola komisiono.
10. Rotterdam („Merkurio”) bedaŭras, ke la buĝeto mencias deficiiton kaj instigas al varbado de pli da membroj por forigi ĝin. Sekcio Amsterdam proponas doni parton de la profito de la libroservo por la biblioteko. La prez. diras, ke la kasisto certe faras ĉion por ekvilibrigi la buĝeton, sed povas esti elspezoj ne antaŭe viditaj. Pri la biblioteko li rimarkigas, ke nur malmultaj anoj pruntas libron; pri la propono li petis lasi al la ĉefestraro la eblecon, se estos necese, konsideri laŭ ebleco.
11. La prez. rimarkigas ke estas 2 raportoj pri la propaganda komitato, unu subskribita de s-ro Bakker; laŭ lia opinio s-ro Bakker estas prez. de la komitato, do ne bezonas fari raporton. Arnhem, Rotterdam („Merkurio”) kaj „Espero”) demandis pri la propagandilo de s-ro Pot. S-ro Bakker diras, ke laŭ „N.E.” (adresar) li ankoraŭ estas gvidanto de la propaganda servo, li do sentis sin devigita fari raporton; cetere ĝis la pasintjara kongreso li sola laboris kaj pri tio raportis; nun li estas prez. de la komitato. Pri la propagandilo de s-ro Pot sekvas diskuto. La ĉefestraro detale klarigas la aferon pri tiu propagandilo. Ĝi promesas ŝanĝi la adreson de la propaganda servo en la adreso en „N.E.”
12. S-ro Ponti pledas sendi la eltondadojn por la gazetarservo ĝustatempe. La adreso de la gazetarservo estu aldonata al la adresaro en „N.E.”
13. La prez. voĉlegas la raporton de la kontrola komisiono de la biblioteko, ĝi estas akceptata.
14. La ĉefdelegito de U.E.A., s-ro Telling voĉlegas sian raporton, konstatas, ke pro plialtigo de la kotizoj eksiĝis kelkaj individuaj membroj kaj plendas pri tio, ke

ekzistas sekcioj de „L.E.E.N.” de kiuj neniu ano estas individua membro de U.E.A. Rotterdam („Merkurio”) petas, ke estonte la raporto de la ĉefdelegito estu presata en „N.E.”.

15. La prez. sciigas, ke ne envenis kritiko skriba pri la laboro de la ĉefestraro. Envenis nur letero de Arnhem kelkajn tagojn post la lim-dato. Li petas konsenton pri trakti tiun leteron. Arnhem demandas, kial la ĉefestraro ne montris pli da aktiveco, ekzemple per aranĝo de prelegvojaĝo, kaj kial niaj U.E.A.-komitatanoj ne raportas en la jarkunveno?
- Kiel statas la kunlaboro kun la Popoluniversitato?
- La delegito de Arnhem klarigas la demandojn kaj aldonas, ke intertempe la estraro sendis „Richtlijnen”, en kiuj ĝi i.a. klopodas malpermesi al la sekcioj inviti eksterlandajn geprelegontojn. Tiel la ĉefestraro ne faras ion kaj samtempe kontraŭstaras aktivecon de la sekcioj. (*Ĉi tio devas esti miskompreno. — Red.*)
- La ĉefestraro respondas, ke proponoj por prelegvojaĝo ofte venas tro malfrue; se venos serioza propono, oni volonte aranĝos. La laboro de la U.E.A.-komitatanoj estas ampleksa kaj kelkfoje konfidenca; estas malfacile raporti pri ĝi. Tamen se estas la deziro de la jarkunveno, ili estonte raportos.
- Kelkaj sekcioj jam kunlaboras kun la lokaj Popoluniversitatoj; al la sekcioj estos sendata peto raportu pri siaj spertoj.
16. Arnhem opinias, ke en „N.E.” troviĝas nur malmultaj interesaj artikoloj. La artikolo pri la tunelo en Velsen estas bona por internacia gazeto. S-ro De Wolf respondas, ke li sendis la artikolon al kelkaj internaciaj gazetoj; oni ne akceptis ĝin. Cetere „N.E.” estas legata ankaŭ en la eksterlando.
17. La prezidanto diras, ke estas fakte du proponoj, nome: aranĝi radio-kurson aŭ serion da prelegoj kaj doni novan celon al la Mabesoone-fondaĵo. Rotterdam („Merkurio”) klarigas la proponon kaj nomas kelkajn personojn, kiuj volas formi la laborkomitatono.

Post diskuto, en kiu pluraj delegitoj partoprenas, la jarkunveno decidas fondi komitatono. Post demando al s-ro Mabesoone, ĉu ni povos doni monon el la fondaĵo por la radio-kurso, li respondas, ke laŭ lia opinio la fondaĵo daŭre devas funkcii, do ĉiam devas ricevi monon. Pasintjare la jarkunveno decidis uzi la monon por anoncado kaj nun por radio-kurso; laŭ lia opinio ambaŭ aferoj povas okazi.

La prezidanto proponas uzi la monon, se eble, por ambaŭ aferoj. Akceptata.

18. La prezidanto diras, ke la propono aperis en nia tagordo, kvankam ĝi fakte estas afero por la redakcio de „De Esperantist”.
- Li petas la sekcion Hago turni sin al la redakcio de „De Esperantist”.
19. La ĉefestraro volonte aŭdas la opinion de la jarkunveno pri la ŝanĝoj de la interna regularo. Pri a. Arnhem opinias, ke neniu sekcio emas laŭ tiu regularo aranĝi kongreson.
- La jarkunveno akceptas la ŝanĝon, Arnhem estas kontraŭ.
- Pri b. Ĝi estas akceptata. La ĝen. sekretariino sendos al la sekcioj leteron kun la ŝanĝotaj datoj.
- Pri c. La jarkunveno akceptas proponon de la ĉefestraro plialtigi la enirsumon por novaj membroj de f 0,25 ĝis f 0,50.
20. La propono de la ĉefestraro, ke la fiksita kotizo por 1958 validu ankaŭ por 1959, estas akceptata.
21. S-ro Holleman petas sendi la monon por la Mabesoone-fondaĵo al la kasistino en Groningen.
22. La prezidanto dubas, ĉu venontjare estos Beneluksa kongreso kaj por informi la jarkunvenon pri la rilatoj kun la Belgaj asocioj li voĉlegas leteron riceviton de la Reĝa Belga Esp. Ligo. Sekcio Haarlem deziras aranĝi kongreson dum Pentekosto 1959. La jarkunveno decidas okazigi la jarkunvenon dum tiu kongreso.
23. Kiel kontrolontoj por la kaso kaj la financa administrado estas elektataj 2 anoj de la sekcio Amsterdam, nome s-ro Bos kaj Herman Veenstra.
24. La laŭ vicordo eksigantaj estraranoj estas reelektataj.
25. La ĉefestraro proponas akcepti anoncojn por „N.E.” kaj per la

## Nederl. Esperanto-Ekzamena Komitato.

En la Esperanto-ekzamenoj, okazintaj en Amersfoort, la 27-an de majo 1958 sukcesis jenaj kandidatoj:

Por la S-diplomo:

s-ro F. N. Beemsterboer; s-ro G. Ellerman, Amsterdam; s-ino H. Kiers, Groningen; s-ro A. M. den Haan, Leiden.

Por la M-diplomo:

s-ro R. R. Baar, Nijkerk; s-ino B. Busscher-Tuin, Finsterwolde; s-ro O. Hoekstra, Zaandam; s-ino J. H. F. Nipperus-Adriaans, Amsterdam; s-ro H. T. Oosten, Amsterdam; s-ino H. A. Postma-Albada, Amersfoort.

Por la E-diplomo:

s-ino J. A. E. Blommestein-Land, Papendrecht; f-ino C. Brakel, Rotterdam; s-ro J. J. Bras, Sterksel; s-ro J. T. M. van der Heijdt, Breda; s-ro P. A. Komen, A. Zandstra, Haarlem; s-ro A. Lauffer, Utrecht; s-ino G. Perdeck-Bonnet, Leiden; s-ino A. C. de Siso-Dijkstra; f-ino A. E. Snijders, Heemstede; s-ro P. H. Snoek, Groningen; s-ino A. M. Stöve-Tuyn, Edam; s-ino C. van Trigt, Den Haag; s-ro E. H. I. Weijer, Ede.

ricevota mono plibonigi la aspekton de la organo. La prezidanto klarigas, ke en tiu kazo la presisto devas fariĝi la eldonisto. Kelkaj delegitoj faras demandojn kaj sugestojn. Poste la prezidanto petas akcepton de la propono kaj ŝanĝon de par. 72-a de la interna regularo; akceptata.

26. La prezidanto diras, ke kelkaj ĉefestraranoj informiĝis pri eventuala aĉeto de magnetofono, sed laŭ lia opinio estas dubo, ĉu la sekcioj povus uzi ĝin. La prez. proponas, ke ni ne aĉetu magnetofonon, sed konservu la monon por io alia ekz. stencilaparato. Akceptata.
27. N.C.K.E. denove aktive laboras: fondiĝis komitatoj por prepari studkonferencon kaj en la aŭtuno grandan kunvenon. La prezidanto promesas publikigi la nomojn de la anoj en „N.E.”.
28. S-ro Albers atentigas pri la broŝuro „Richtlijnen” por la sekcij estraranoj. F-ino Vermaas bedaŭras, ke ĝi aperis en la Ned. lingvo.

## NEKROLOGO.

Nia membro s-ro N. H. Beun, ano de nia sekcio en Harlema, akcidente mortis la 29-an de majo 1958-a en la aĝo de 67 jaroj. Li estis fidela esperantisto kaj jam dum multaj jaroj ano de la nomita sekcio. Li ripozu en paco kaj ni kore kondolencas lian familion pro ĉi tiu grava perdo.

## GRAVA ALVOKO.

La granda kaj bela nederlanda revuo „VIZIER” jam dum kelkaj monatoj presigas multajn korespond-adresojn. En la numero de 28/6 aŭ 5/7 aperos ankaŭ adresoj de eksterlandaj geesperantistoj. La redakcio atendas reagojn, do estas tre grave, ke ĝi ricevos ilin. Ni do alvokas nederlandajn geesperantistojn skribi al „VIZIER”, postbus 163, Leiden, por peti korespond-adresojn.

## Verda Semajno en Svedujo.

La Karlskoga Esperanto-Societo aranĝos de la 13-a ĝis la 20-a de aŭgusto 1958-a verdan semajnon kaj ĝi esperas, ke multaj eksterlandaj gesamideanoj ĝin partoprenos. Loĝado kaj manĝado estos senkostaj ĉe tieaj geesperantistoj. Por eksterordinaraj ekskursoj kaj dumtempaj manĝoj la partoprenontaj devos pagi 25,— sv. kr. Pliajn informojn donas s-ro E. Bonander, Del. de U.E.A. Karlskoga, Svedujo.

S-ro Mabesoone opinias, ke povas esti bona sekretario, kiu ne bone komprenas Esperanton.

S-ro Bakker proponas enketon en la sekcioj, kiun lingvon oni preferas.

S-ro Schipper klarigas, kial li rekomponis la L.E.E.N.-kanton. Li rekomendas konsulti fakulon antaŭ ol la ĉefestraro decidus. S-ro Woessink petas alsendon de listo de la sekcijaj sekretarioj al ĉiuj sekcioj. Plue li informas la kunvenon pri la Eŭr. Lingvo-Kampanjo kaj la baldaŭa enketo inter 3000 Eŭropaj urbestroj.

La protokolintoj:

H. Arends

E. J. Woessink



## KOMUNIKOJ DE LA ĈEFESTRARO.

La en la junia numero de „N.E.” aldonita cirkulero estis tre bonvena al niaj sekcioj. La 10.000 ekzempleroj, kiujn ni havis, jam estas for, kvankam ĝis nun nur 13 sekcioj mendis. Ĉar ni intencas presigi ankoraŭ kvanton, ni petas tiujn sekciojn aŭ ĝeneralajn membrojn, kiuj volas uzi la cirkuleron por sia propagando, bonvole mendi ĝin antaŭ la 31-a de aŭgusto. La adreso estas: F-ino Th. v. d. Reijen, Rijksstraatweg 90, Haarlem; telefono: 0 2500-57433.

—o—

La sekretarioj de la sekcioj ricevis nomliston de siaj kolegoj. Se la sekretario de via sekcio ekzigos, bonvolu skribi tion al la ĝen. sekr. kaj tiam samtempe menciui nomon kaj adreson de la nova funkciulo, por ke la ĝen. sekr. povu presigi ilin en „N.E.”. Ĉiuj sekciaj sekretarioj notu tion sur la nun ricevitan liston.

—o—

Ĉu en via urbo jam estas „Zamenhof”-strato? Skribu al la urbestro kaj petu, ke oni bonvolu honori tiel la aŭtoron de Esperanto okaze de la centa datreveno de lia naskiĝo.

—o—

Bonvolu ne forgesi la alvokon en la junia numero de „N.E.” por serĉi kontakton en via loĝloko kun la mond-federalistoj.

—o—

## N.C.K.E.-anoj:

A.N.S.E.: G. Hamming kaj A. Nijhuis;  
F.L.E.: H. N. v. d. Akker kaj A. F. v. Haren;  
K.U.N.E.: H. A. de Hoog kaj J. v. Keulen;  
L.E.E.N.: Th. v. d. Reijen kaj F. Weeke;  
N.K.: fr. Arsenius;  
NoSoBe: C. A. Verlinde;

Dum ĉi tiu jaro s-ro Van Haren estas la prezidanto.

—o—

## REGULAR-ŜANĜOJ

Dum la jarkunveno, okazinta la 11-an de majo 1958-a en Utrecht, oni aprobis kelkajn ŝanĝojn de la regularo. Ĉi-sube sekvas la novaj tekstoj de la koncernaj paragrafoj.

Art. 15. De secretaris van elke afdeling voert de correspondentie met het hoofbestuur, zendt vóór 1 febru-

ari van elk jaar aan de algemene secretaris een verslag van de toestand en de werkzaamheden van zijn afdeling en onmiddellijk, nadat zij hem bekend geworden zijn, de veranderingen in het aantal en in de woonplaats van de leden van zijn afdeling.

Artikel 21. Algemene jaarvergaderingen worden uitgeschreven door het hoofbestuur in gevallen en onder voorwaarden hierna te vermelden. Als regel worden de algemene jaarvergaderingen in mei of juni gehouden.

Art. 22. Elk jaar kan, als regel in mei of juni, een congres worden georganiseerd, in welks kader de algemene jaarvergadering wordt gehouden. Het congres wordt gehouden op uitnodiging van een der afdelingen, behoudens goedkeuring van het hoofbestuur. De voorbereiding en regeling van het congres geschiedt overeenkomstig het congresreglement, vastgesteld door het hoofbestuur.

Art. 23. Voorstellen voor de algemene jaarvergadering worden uiterlijk 2 maanden voor de vergadering in het verenigingsorgaan bekend gemaakt, eventueel voorzien van een prae-advies van het hoofbestuur.

Art. 33. Voorstellen voor de algemene jaarvergadering moeten, toegelicht, uiterlijk 3 maanden voor die vergadering bij de algemene secretaris worden ingediend; amendementen, eveneens toegelicht, uiterlijk 1 maand voor die vergadering, welke daarna per circulaire aan de afdelingen bekend gemaakt zullen worden.

Art. 58. Afdelingen en algemene leden betalen aan de algemene kas een bijdrage, die door de algemene jaarvergadering in overeenstemming met de begroting wordt vastgesteld. Nieuwe leden betalen bij toetreding f 0,50 inschrijfgeld aan de algemene kas.

## Autunaj FERIAJ Kursoj

estos denove aranĝataj en La Sporta Altlernejo de Vejle, Danlando, 19—26 de oktobro 1958-a, plej bela tempo de la jaro, ĉar tiam portos ĉirkaŭaj arbaroj luksan multkoloran veston. Kursoj: konversacia, perfektiga kaj daŭriga. Venu por lerni kaj ĝui. Petu senpagan programon ĉe

L. Friis,  
Ingemannsvej 9,  
Aabyhøj, Danlando.

## Semajnfina Renkontiĝo en Arnhemo (Nederl.).



(La libro-stando aranĝita de nia Arnhema sekcio)

Post arango en 1957-a de unutaga „Printempa Renkontiĝo” la Arnhema Kunlaborkomitato decidis ĉi tiun jaron prepari „Semajnfina Renkontiĝo”.

Ĉi okazis la 14-an kaj 15-an de junio, parte en eksterurba salono parte en Arnhema parko. Partoprenis entute proks. 100 personoj, inter kiuj, krom esperantistoj el pluraj nederlandaj urboj, dudeko da germanoj kaj unu italo.

Sabatvespere la artisto Hermen Bomhof el Apeldorno deklamis kaj kantis poemojn en Esperanto kaj en regiona veluva dialekto. Krome oni komune kantis kaj post paŭzo estis montrataj du novaj sonfilmoj kun Esperanto-teksto, nome Philips-rapodio kaj filmo pri Nov-Zelando.

Dimanĉe s-ro Van Essen el Rotterdam faris tre interesan prelegon pri „Per Gynt” de H. Ibsen kaj aŭdigis per sonbendo partojn el tiu dramo.

La arango speciale estis organizita por la 14-a kaj 15-a de junio, ĉar ĝuste tiam komenciĝis la internacia ekspozicio de skulptaĵoj en la bela Arnhema parko „Sonsbeek”. Dimanĉe posttagmeze oni komune vizitis tiun ekspozicion. Unu el la Arnhemaj geesperantistoj, s-ro Daniëls, kiu mem estas skulptisto, klarigis la skulptaĵojn,

rakontis pri ili kaj respondis al multaj demandoj.

Je la fino, la prezidanto, s-ro A. Henstra, povis konstati, ke la ĉeestintoj estas kontentaj kaj ke la Arnhemanoj povos esperi, ke ili la sekvontan jaron revenos al Arnhemo.

Grave por la sukceso de la renkontiĝo estis la bela vetero kaj krome, ke dum la du tagoj ĉiuj havis bonan okazon inter si paroli pri diversaj temoj (kaj ankaŭ kaptis tiun okazon).

E. J. Woessink,  
sekretario de la „Arnhema  
Kunlaborkomitato”.

## Korespond-Adresoj.

F-ino Vilemina Válková, ulice Antonia Slavika ĉ, 1/II, Ĉeĥoslovakujo, interesigas pri Nederlando kaj floroj.

F-ino Henriette Troussard, 51 rue de la Bretonnerie, Orléans (Loiret). Francujo, interesigas precipe pri naciaj kostumoj, vizitos Amsterdamon en aŭgusto.

F-ino Nikole Violeau, 7 Rue Denis Papin, Orléans (Loiret), Francujo, interesigas pri bildoj de reĝaj familioj, vizitos Nord-Holandon en aŭgusto.

## Ned. Esperantisten-Ver. „La Estonto Estas Nia”.

### DAGELIJKS BESTUUR:

F. Weeke, IJsseldijk 20, Diepenveen: voorzitter en vic-ĉefdelegito U.E.A.  
E. de Wolf, Joh. de Breukstraat 18, Haarlem: vice-voorz. en 2-e sekr.  
Telef. 0 2500-56133.

Mej. Th. E. S. v. d. Reijen, Rijksstraatweg 90, Haarlem: sekr.esse.  
Telef. 0 2500-57433.

B. J. J. Albers, Olympiaweg 69 III, Amsterdam (Z.): penningmeester.  
Postrek. 34563. Telef. 0 20-734601.

### ADMINISTRATIE „NED. ESP.”:

P. M. Mabesoone, Pythagorasstraat 122, Amsterdam (O.). Telef. 0 20-51379.

### BOEKENDIENST:

Mevr. S. Mabesoone-Visser, Pythagorasstraat 122, Amsterdam (O.).  
Postrek. 76915.

### BIBLIOTHEEK:

E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.

### ALG. NED. ESP. EXAMENCOMMISSIE:

Mej. H. M. Mulder, Zilvermeuwstraat 29, Badhoevedorp: sekr.esse.

### FONDAJO-MABESOONE:

Mej. J. E. Prins, Hora Siccamasingel 294, Groningen: penn.esse.  
Postrek. 815889.

### ĈEFDELEGITO U.E.A.:

J. Telling, Schietbaanweg 106 a, Rotterdam. Postrek. 242619.

### PROPAGANDA-DIENST:

J. Calado, Vergeet-mij-nietstraat 29 b, Rotterdam.

## El Niaj Sekcioj.

### Amsterdama sekcio U.A.S.E.

La 24-an de junio okazis nia lasta konversacivespero antaŭ la ferio. Ni esperas, ke en septembro multaj membroj trovos la vojon al nia salono, kun plifortigita deziro kunlabori al agrablaj kaj instruaj kunvenoj. Sed antaŭ tiu tempo, de la 17-a ĝis la 26-a de aŭgusto, vizitos nin grupo da francaj geesperantistoj. Al s-ro Delaire, la gvidanto de la kursoj kaj de la karavano, la Amsterdama Kunlabora Komitato Esperantista proponis kelkajn allogajn ekskursojn. Partoprenante en tiuj aranĝoj, nederlandaj gesamideanoj povos ĝui agrablajn tagojn kaj kontribui al la sukceso. Tiu, kiuj deziras gastigi franca(j)n samidean(in)o(j)n, bonvolu sciigi tion al la sekretariino de A.K.K.E.: s-ino W. Bohlander, Bertelmanstraat 20, Amsterdam-Z.

### Sekcio Groningen.

La 10-an de majo okazis en Groningen la provinca trafik-veturo por diversspecaj motoristoj. En la regu-

lar-libreto nia tiea sekcio metis tre bonan anoncon pri Esperanto.

### MALSATIS MI.

*Iam mulsatis mi kaj vi min nutris;  
Soifis kaj por trinki donis vi.*

*Iam senvesta mi kaj korpon mian  
kompate kaj fervore vestis vi.*

*Karcelo la mizera min entenis  
kaj kiel sunradio venis vi.*

*Kaj mi, en miro: „Sed, sinjoro,*

*Kiam malsatis Vi kaj mi Vin nutris?  
Soifis kaj por trinki donis mi?*

*Kiam senvesta Vi kaj korpon Vian  
kompate kaj fervore vestis mi?*

*Kiam karcer' mizera Vin entenis  
Kaj por konsoli venis mi?"*

*Kaj li:*

*„Kion vi faris al la plej humila homo,  
tion al mi vi faris. Benata estu vi!"*

P. E. Teto.

